

## La Kod-artikolo 330

Unua prezenzo en *Teatro Antono*, en Parizo, la 12an de decembro 1900.

### Rolantoj:

Labriĝo  
La Prezidanto de la tribunalo  
La Vicprokuroro  
La Pedelo

### Traduko:

Gaston Waringhien

La historio de tiu traduko estas tre stranga. Traduko sub la titolo „La malfeliĉoj de Briko” estis farita de G. Waringhien, dum li vivis en Lille dum juneco. Tiu traduko en facila lingvo celis grupon de junaj komencantoj. Poste ĝin brajligis S-ro Curnelle kaj donacis al brajla biblioteko de IEBB en Saint-Dizier. En 1958 post la morto de la bibliotekisto, la libraro iris al la Esperanto-fako de *The national Library for the Blind* en Londono. Hazardo retrovinte la titolon en nova eldono de katalogo, J. Gonin retpapis la tradukon, kiun la redaktoro de Franca Esperantisto sendis al Prof. Waringhien por kontrolo. La tiama tradukinto estis eĉ forgesinta tiun fruan laboron sed bonvolis reprilabori ĝin por nuna eldono.

Verkita rekte por la teatro de Courteline en 1900.

## La Kod-artikolo 330

Scenejo: *Ĉambro de la pariza Jugpalaco.*

**Pedelo** La Jugistoj! Demetu la ĉapelojn, Sinjoroj!  
(*La tri jugistoj sidiĝas. Ĉiuj faras same.*)

**Prezidanto** La kunsido komenciĝas. Alvoku, Pedelo!

**Pedelo** La Ŝtata Akuzisto kontraŭ Labriĝo. Publika ofendo al la pudoro. Labriĝo!

(*Labriĝo ekstaras kaj antaŭeniras.*)

**Prezidanto** Viaj nomo, antaŭnomoj kaj domicilo.

**Labriĝo** Labriĝo, Johan-Filipo, 36-jara, 5 bis Avenuo de La Motte-Piquet.

**Prezidanto** Via profesio.

**Labriĝo** Sindefenda filozofo.

**Prezidanto** Kion vi diras?

**Labriĝo** Sindefenda filozofo.

**Prezidanto** Kion vi volas komprenigi per tiuj vortoj?

**Labriĝo** Mi volas komprenigi, ke, decidinte vivi laŭ perfekta honesteco, mi penadas ĉirkaŭiri la leĝon kaj sekve eskapi ties ungeojn. Ĉar mi timas la leĝon, kiu minacas forrabi de la honestuloj ilian rajton libere spiri, egale kiel la sociajn strukturojn, kiuj difektas iliajn heredajon, posedon kaj tankvilon.

**Prezidanto** Jen strangaj doktrinoj.

**Labriĝo** La doktrinoj, inspiritaj de la saĝo mem, de unu viro, kiu neniam ebriigis, neniu frapis nek insultis, priştelis neniu eĉ per unu groso, neniam levigis matene sen la malrankvila ideo, ke li eble ne kušigos vespere en sian liton.

**Prezidanto** Vi estas anarkiisto!

**Labriĝo** (*levante la ŝultrojn*) Ha! ha! ha! La Respubliko estus certe la plej granda stultaĵo en la mondo, se la anarkiismo ne estus ankoraŭ pli stulta. Ne! Mi estas partiano de Filip-Aŭgusto aŭ de

Ludoviko la Deka, alnomata la Kverelema.<sup>1</sup> Estas cetere diskonata afero, ke ne ekzistas plu eĉ unu respublikisto en Francio. Tion ĉiuj scias, neniu konfesas, kaj la aferoj iradas pro tio nek pli bone, kio estus miriga, nek pli malbone, kio estus malfacila.

**Prezidanto** Ĉu vi estis neniam kondamnita?

**Labriĝo** Neniam.

**Prezidanto** Tio ĉi mirigas min.

**Labriĝo** Mi kredas vin senpene; sed mi estas lerta knabo.

**Prezidanto** (ironie) Ne forgesante flati vin mem.

**Labriĝo** Mi ja ne min flatas, ĉar mi solvis la malfacilan problemon, ke mi povas, tridek ses jarojn aĝa, prezenti samtempe pasintajon sen malhonoro kaj policregistron sen makulo.

**Vicprokuroro** Jen belaj ŝvelparoloj: ni regustigu viajn asertojn. Vi neniam estis kondamnita, tio estas vera; sed la pri vi kolektitaj informoj ne estas favoraj. Ili prezentas vin kiel personon, kun kiu oni preskaŭ ne povas interrilati, ian specon de ĉikanemulo, procesantan, malican, ruzan, eterne kverelantan kun la ceteraj vivantoj. La jugistoj estas senĉese okupataj por decidi pri viaj etaj malkonsentoj kun la ordinaraj homoj, kaj la arkivoj de la kvartalaj policejoj estas plenplenaj de protokoloj, en kiuj oni legas vian nomon. (*Foliante faskon da slipoj.*) Unu tagon dum ok horoj, vi tenadas sub batanta pluvo, antaŭ la teraso de kafejo, iun fiakriston, kiu fine incitega protestas kaj tumultigas la homamason.

**Labriĝo** Tiu viro, al kiu mi donis tridek ses centimojn por kvinminuta veturado, postulis, ke mi pagu al li la tutan horon, pretekstante, ke mi haltigis lin dum du sekundoj je la pordo de tabakvendejo. Li proklamis sian rajton, mi firmigis ĉe la mia.

**Vicprokuroro** Alian fojon, al iu tramkolektisto vi pretendas pagi vian sidlokon, kiu kostas dek kvin centimojn, per bileteto de mil frankoj.

**Labriĝo** La kontrolisto malakceptis de mi validan ŝangkuponon, tial ke mi ĝin ŝiris glitante sur la kota pavimo – ne por mia plezuro, mi petas vin tion kredi. Mi spezis per negentilaĵo kontraŭ tia mal-

sincereco. – Permesate al vi levi la ŝultrojn! Ĉiu en ĉi tiu mondo, mastre regante sian vivmanieron, uzas ĝin laŭ sia plaĉo. Rilate min, mi komence dediĉis mian vivon por servi al aliaj homoj, kun la espero, ke la aliaj iam tion rimarkos kaj dankos al mi pro miaj bonaj intenco. Bedaŭrinde homo renkontas du nesolveblajn malfacilaĵojn: scii ekzakte, kioma horo estas, kaj komplezi sian proksimulon. Je tiaj kondiĉoj, naŭzita de tio, ke mi ĉiamaniere penadis esti bonkorulo kaj sukcesis fariĝi nur dikkapulo, fimumata, trompata, ekspluatata, fine konvinkita, ke la tuta rezono de la homaro konsistas en jena malnoblaĵo: „Se mi ne timas vin, mi fajfas pri vi”, mi decidis ŝirmi de nun mian pravan egoismon sub la tegmento de tiu porkejo, kiun oni nomas la Leĝeco.

**Prezidanto** Kiam vi finos viajn paradoksojn, la tribunalo povos ekzameni la aferon.

**Labriĝo** Mi ne faras paradoksojn: neniam mi faris ilin kaj ne intencas komenci, ĉar mi ilin abomenas, malšatas kaj timas, kiel publikulinon. La vero estas, ke ni vivas en lando, de kie la simpla saĝo eskapis, tiele ke Sinjoro de la Palisse<sup>2</sup> tie ŝajnus frenezulo, kaj ke, se homo kun trankvila menso, kun sana kaj egala spirito, volus prediki evidentaĵon, ĝin demonstri per A plus B, oni lin akuzus pri ekstravaganco kaj minacus tujmamente per frenezjako.

**Prezidanto** Ni finu tamen!

**Vicprokuroro** Mi mem estus ĝin proponinta. Vi estas ĉi tie por respondi la demandojn, kiuj estos metataj al vi, kaj ne por dissendi oratorajn periodojn, kiuj ne konvenas en tiu ĉi juĝa ĉambro.

**Labriĝo** Oni min demandu.

**Prezidanto** Vi scias, pri kio vi estas juĝota.

**Labriĝo** Neniel. Pri kio?

**Prezidanto** Pri tio, ke vi elmontris vian postaĵon.

**Labriĝo** Mi?

**Prezidanto** Vi.

**Labriĝo** Al kiu?

1. Li citas ironie mezepokajn francajn reĝojn.

2. Tipo de iu, kiu asertas ofte tro evidentajn veraĵojn.

**Prezidanto** Al dek tri mil sescent okdek sep personoj, kies plendoj kušas en la dosiero.

**Labriĝo** Por mia defendo mi citas la tre konatan purecon de miaj moroj. Elmontri mian postajon! Por kia celo?

**Prezidanto** Tion ĉi klarigos la debatoj. Dume tamen, dek tri mil sescent okdek sep personoj deklaras, mi ĝin ripetas, ke ili ĝin vidis.

**Labriĝo** Tro ĝentila mi estas, por ili kontraŭdiri, mi konsentas, ke ili ĝin vidis, sed mi absolute neas, ke mi ĝin elmontris al ili.

**Vicprokuroro** Vi ludas per la vortoj.

**Labriĝo** Tute ne. Mi penas, kontraŭe, fermi la vortojn en ilia vera senco kaj sekve prezenti la aferon kun ĝia vera aspekto.

**Prezidanto** Do, vi neas la faktojn, kiujn oni riproĉas al vi?

**Labriĝo** Mi neas, ke mi riskas aplikon de la 330a kod-artikolo, kiu difinas kaj punas la delikton de publika ofendo al la pudoro.

**Prezidanto** Vi povas sidiĝi. (*Labriĝo residigas.*) Ĉu estas atestantoj?

**Vicprokuroro** Ili estus tro multaj, Sinjoro Prezidanto. La ŝtata akuzisto decidis do alvoki neniu. Cetere, ĉiel, la delikto, kiu kušas ekster diskuto, estis konstatita de Majstro Grujero, asignisto en Parizo, per dokumento redaktita laŭ bona kaj justa formo, per la terminoj difinitaj de la leĝo, kaj kies legadon mi petos de la tribunalo la permeson fari.

**Prezidanto** La tribunalo vin aŭskultos. Legu, sinjoro Vicprokuroro.

**Vicprokuroro** (*legante*) „En la jaro 1900a, la 21an de septembro, mi Johano Alfredo Hiacinto...”

**Labriĝo** (*duonvoĉe*) Ĉiuj asignistoj nomiĝas Hiacinto; oni neniam sciis kial.

**Pedelo** Silenton!

**Vicprokuroro** „... Johano Alfredo Hiacinto Grujero, asignisto apud la unua-istanca tribunalo kunsidanta en Parizo, estis rekviiziita de la Societo de la Elektraj Transportoj de la Ekspozicio,<sup>3</sup>

3. Temas pri la Universala Ekspozicio.

por ke mi redaktu konvenan kaj legan konstaton kontraŭ Labriĝo, Johan-Filipo, tial ke li kutime malobeas la leĝojn pri la publika moraleco kaj skandalas per la konstanta elmontro de sia nudaĵo la pudoron de la personoj veturigataj de la Champ de Mars al la Invalides helpe de la Rultrotuaro. Sekve, irinte sur tiun rultrotuaron kaj alveninte al la avenuo La Motte-Piquet, antaŭ la domo kun la numero 5 bis, ni nete distingis en la fundo de apartamento, al ĉiuj malkaŝata per la disigo de large malfermita fenestro, ian specon de neperfekta sfero, fendita laŭ la vertikala direkto, kaj prezentanta sufiĉe ĝuste la aspekton de dupetala trifolio, kiun ni rekonis kiel la suban kaj postan parton de persona klinika kvazaŭ por kisi la teron...”

**Labriĝo** Mi ne kisis la teron.

**Pedelo** Silenton, do!

**Prezidanto** Post momento!

**Labriĝo** Mi serĉis dugrošan moneron.

**Vicprokuroro** (*legante*) „... Tridek sep minutojn poste, kiam la rultrotuaro finis sian kurson, ni estis rekondukitaj al nia deirpunkto, kie estante ni povis konstati, ke la spektaklo estas ĉiam la sama. Duan fojon, same; trian fojon, same; kvaran fojon, same.

**Prezidanto** (*al Labriĝo*) Vi ĉiam serĉis viajn du grošojn?

**Labriĝo** La monero forglitis sub meblon, mi penis rešovi ĝin al mi per la pinto de mia pluvombrelo.

**Prezidanto** (*levante la ŝultrojn*) Jen belaj klarigoj! Finu, sinjoro Vicprokuroro.

**Vicprokuroro** (*legante*) „... Ni ankaŭ rimarkis, ke la ĉi-superrakontitaj faktoj, for ke ilin preteratentis la personoj lokitaj sur la elektra platformo, ŝajnis eksciti tre vivan malkontenton, kiu kaŭzis tre multajn protestojn kaj laŭtegajn ekkriojn, el kiuj konvenas citi la sekvantajn: Naŭzege! – Malnoblulo! – Porko! – Ho ĉielo! – Kion mi vidas! – Estas hontego! – Amelia, mi malpermisas al vi rigardi tien!... Pri tio ĉi ni redaktis la nunan protokolon, kiun la rekvizicianto uzos laŭleĝe kaj ni lasis al ĝi la ĉi nunan kopion, kies kosto estas 11 fr. 25, plus unu folio de speciala papero, kostanta 60 centimojn.”

**Prezidanto** Labriĝo!

**Labriĝo** (*levigante*) Sinjoro Prezidanto?

**Prezidanto** Ĉu vi volas prezenti rimarkojn?

**Labriĝo** Mi volas prezenti mian defendon.

**Prezidanto** Vi penos esti mallonga.

**Labriĝo** Mi penos esti klara. Mi ne bezonas la eblon paroli, se la tribunalo, kiu ĝin donas al mi, marĉandas al mi samtempe la rajton ĝin uzi.

**Vicprokuroro** La tribunalo evitigis al vi konfuzantajn atestajojn.

**Labriĝo** (*ridetante*) Mi liberigas vin ja advokata pledo. Ni tiel rivas per favorkoro kaj animgrandeco. Cetere jen la faktoj en plena simpleco. – La 15an de januaro 1898, provizita per trijara lukontrakto, mi ekokupis, sur la unua etaĝo de la domo kuŝanta 5 bis en la avenuo La Motte-Piquet, apartamenton kun lupozo de 1 500 fr. Mi ŝatas tiun kvartalon, kiun la najbaraj monaĥejoj kaj kavaleri-kazernoj plenigas per trumpetadoj kaj sonorilbruoj, kie kuniĝas, je la dimanĉoj belveteraj, soldatoj kaj popolanoj je la terasoj de la drinkejoj, kaj kiu sukcesas ne esti plu Parizo kaj tamen ne fariĝi provinco. Ĝi estas favora al la studado kaj konvena por la revado. Mi do tie revadis trankvile kaj kvieta studadis, kiel mi akiris la rajton tion fari, kiam la Societo de la Elektraj Transportoj, sub la preteksto kunlabori al la gloro de la Ekspozicio, venis kontribui en neatendita maniero al la pitoreskeco de la kvartalo. Kaj ekde tiam komenciĝis la farso! De la oka matene ĝis la dek-unua vespero, malhelpante do mian vesperan dormadon, se mi intencis kuſiĝi frue, kaj mian matenan dormadon, se mi deziris leviĝi malfrue, la trotuaro – la rultrotuaro! – transportadis antaŭ miaj fenes-troj ondojn da kunpremitaj homamasoj: viroj, virinoj, vartistinoj kaj soldatoj; ĉiuj spritaj, bonhumoraj personoj, kiuj kritikaĉis mian meblaron, kraĉis en mian salonon kaj ŝoviĝadis de babordo al tribordo, kantante miacele: „Ho! Mulkapo! Bulnapo! Pul-ĉapo!” dum elpremataj per afablaj fingroj la ĉerizkernoj pluvadis en mian dormĉambron, alterne kun ternuksoj, olivoj kaj kukurabaj ŝeloj. (*Rido de la jugistroj.*) Mi petas de la Tribunalo la permeson ne partopreni en ties gajeco, kiun mi komprenas, sed al kiu mi ne povas aliĝi pro personaj motivoj.

**Prezidanto** Rapidu al la faktoj!

**Labriĝo** Mi alvenas la ili. – Prave mirigita, apogante min sur la artikolo 1382 de la Civila Kodo, kiu deklaras: „Cia fakteto, kiu kaŭzas domaĝon al aliulo, devigas la kaŭzinton al riparado.” mi provizore asignis la Societon de la Elektraj Transportoj, kiu respondis al mi: „Mi ne konas vin; mi ne scias, kion vi volas diri. Mi, Societo, subskribis kontrakton kun la komisiono de la Ekspozicio, kontrakton, kiu rajtigas min ruladi mian trotuaron de la Champ de Mars ĝis la Invalides laŭlonge de la avenuo La Motte-Piquet. Se, koncesiante al mi tiun rajton, la Ekspozicio transpaſis la sian, turnu vin kontraŭ ĝin kaj lasu min trankvila.”

**Prezidanto** La Societo tute pravis.

**Labriĝo** Centfoje! Tial, sendispute paginte la kostojn de la proceso, mi provizore asignis la Komisionon de la Ekspozicio, kiu diris al mi: „Mi ne konas vin; mi ne scias, kion vi volas diri. Mi, Ekspozicio, subskribis sinalagmatikajn<sup>4</sup> kontraktojn kun la koncesiuloj de la terenoj entenataj, ĉirkaŭbaritaj, enfermitaj interne de miaj palisaroj. Ĉu tia estas via kazo? Ĉu mi faris al vi promesojn, kiujn mi ne plenumis? – Ne! – Nu, kion do vi gurdas al mi? Se la Pariza Magistrato malrespektis sian devon, ĉar ĝi lasis al mi la povon koncesii iun rajton, turnu vin kontraŭ ĝin kaj lasu min trankvila.”

**Prezidanto** La Ekspozicio pravis.

**Labriĝo** Tiel pravis, ke eĉ unu minuton ne venis al mi la ideo diskuti. Por la dua fojo mi pagis do la koston de la menuo, kaj provizore asignis la Parizan Magistraton, kiu diris al mi – ĉar tiu afero ŝajnas vere ia kanzona rekantaĵo, ia refreno de kantafejo! – kiu diris al mi: „Mi ne konas vin; mi ne scias, kion vi volas diri. Mi, Pariza Magistrato, vendis kontraŭ tia sumo al Kolbastranĉisto, via luiganto, terenon, kiun mi posedis Avenuo de La Motte-Piquet, kun la rajto konstrui tie domon kaj ricevi de ĝi renton; ĉu vi estas nomata Kolbastranĉisto? Ĉu ni interkontraktis? Nu? Ne? Do, kion vi postulas? – Se via apartamento ne plu plaĉas al vi, iru logi aliloken kaj lasu min trankvila.”

4. Jura termino, signifanta simple „reciprokaj”.

**Prezidanto** La Magistrato pravis.

**Labriĝo** Evidente! – Tial, kun admirinda konstanteco, mi provizore asignis Kolbastranĉiston, mian luiganton...

**Prezidanto** ... kiu diris al vi: „Mi ne konas vin...”

**Labriĝo** Tute male!... Kiu diras al mi: „Mi bone konas vin! Vi estas gaja ŝercemulo, kaj ĉio tio estas nur artifiko por ne pagi la lupon. Nu, homo, vi ne trompos min. Monon en mian manon, aŭ la jugan konfiskon! Bone, bone!” Vane mi objetis: „Pardonu, la artikolo 1719a, kiu regas la lu-kontraktojn, devigas la luiganton konservi sian domon en perfekta uzo-stato.” – „Mi absolute ne zorgas pri la artikolo 1719a,” respondis tiu ulo, „ĉar la artikolo 1725a deklaras, ke la domposedanto estas neniel responda pri la perturboj kaŭzitaj de aliaj personoj en la ĝuado de la luigataĵo. La Avenuo La Motte-Piquet ne apartenas al mi. Do, estas la Regna Konsilio, kiu devas decidi. Se vi ne estas kontenta, turnu vin al ĝi kaj lasu min trankvila.”

**Prezidanto** Via luiganto estas saĝa homo, kaj li donis al vi bonegan konsilon. Efektive, vi devis unue anstataŭigi vin per prokuroro, kaj, antaŭ la Regna Konsilio, juĝe asigni la Parizan Magistraton, kiu siavice estus asigninta la Societon de la Elektraj Transportoj, krom la apelacio de tiu Societo al la Komisiono de la Ekspozicio, kun la civila respondeco de la Ministro pri la Komerco. Estis ja tute simpla afero. (*Al la Vicprokuroro.*) La homoj estas vere strangaj, ili dronus en glaso da akvo. (*Al Labriĝo.*) Nu, do?

**Labriĝo** Do, la konkludo de la anekdoto estis jena: ĉar ĉiuj estas pravaj, mi troviĝis mem malprava, kvankam mi nenion faris por tio. (*La Prezidanto skizas ian geston, kiel homo, kiu ne povas helpi.*) Tial mi ekpensis peli mian malpravecon tiel malproksimen, ke mi retrovis min tuj prava, ĉar, naŭ fojojn el dek, la Legô, tiu senhontulino, ridetas al tiu, kiu ĝin perfertas.

**Prezidanto** En la nomo de la Justico, antaŭ kiu vi staras, mi admononas vin respekti la Legon.

**Labriĝo** Ekzistas nenia rilato inter la Justico kaj la Legô, kiu estas nur ties misformo, karikaturo kaj parodio. Ili estas du duonfratoj, kiuj kraĉas al si reciproke en la vizaĝon, insultas unu la alian pri bastardeco kaj vivas konstante en armita malpaco, dum la hones-

taj homoj, minacataj de la ĝendarmoj, kun peza, maltrankvila koro atendadas, ĝis ili akordiĝos.

**Vicprokuroro** (*incitite*) Unu vorton pli kaj mi postulos kontraŭ vi la justan aplikon de la puno.

**Labriĝo** Kia puno? Vi rigardas nin kiel infanojn. La artikolo 222a difinas nur kaj punas nur la insulton al la jugisto. Pri la leĝo mem mi havas la rajton pensi, kion mi volas, kaj laŭte diri, kion mi pensas.

**Prezidanto** Ĉiuokaze vi ne estas ĉi tie en la Ĉambro de la Deputitoj. Vi primokas la publikon. La artikolo 330a...

**Labriĝo** La artikolo 330a punas per trimonata ĝis dujara malliberiĝo ĉiun, kiu publike ofendas la pudoron; mi konas ĝin tiel bone, kiel vi.

**Prezidanto** Tiele vi ankaŭ scias, kiel mi mem, ke ĝi koncernas vin same kiel ĉiujn ajn.

**Labriĝo** Laŭprincipe, jes; en mia okazo, ne.

**Prezidanto** Kiel, ne? Sin tute senvestigi antaŭ homamaso, ĉu tio ne konsistigas ofendon al la pudoro?

**Labriĝo** Jes, laŭprincipe; ne, en la nuna okazo.

**Prezidanto** Kial ne?

**Labriĝo** Tial ke la ofendo estas vera ofendo nur, se ĝi estas farita, plenumita, efektivigita en la kondiĉoj de publikeco postulita de la legdoninto.

**Prezidanto** Mi ripetas, dek tri mil sescent okdek sep personoj...

**Labriĝo** ... vidis mian postaĵon, konsentite. Nu, kaj poste? Sufiĉis simple al ili ne rigardi ĝin.

**Vicprokuroro** Tio estas tro facila!

**Labriĝo** Tro facila? Ĉu mi metis ĝin ĉe la fenestro, mian postaĵon? elmetis ĝin al la sunradioj, kiel nematuran melonon? „Ni distingis, diras la asignisto Grujero, **en la fundo de apartamento...**” Kio estas tro facila, sinjoro, tio estas ekkapti alies propraĵon kaj uzi ĝin kvazaŭ la sia; tio estas ŝteli al ili ilian monon, sub la mensoga preteksto garantii al ili la rajton al la dormo, al hejmeco kaj al ripozo, dank' al povo, kiun oni ne posedas; delikto difinita kaj punita de la artikolo 405a.

**Prezidanto** Sed vi ja konas la Kodon...

**Labriĝo** ... kiel simpla krimulo. (*Ridetante.*) Estas eĉ miriga la penso, ke la konado de la kodo kaj la timo pri ĝiaj sekvoj prezentas la solan regionon komunan al la honestuloj kaj al la kanajloj. (*Ekmovo de la Prezidanto.*) Ho, sinjoro Prezidanto, pardonu: ĉiuj devus penadi interkompreniĝi kaj respekti ĉies rajton. (*Prenante paperon el sia pošo.*) Laŭ la asignaĵo jena – ĉar se vi havas, vi, la konstaton, kiu kondamnas min, mi havas, mi, alian, kiu min senkulpigas – estas konstatite, ke mia loĝejo, situanta kvin metrojn pli alte ol la stratnivelo, vidalvide al ne konstruita terpeco, ne estas videbla por la preterpasantoj kaj, plie eĉ, de la najbaroj, pro tio, ke ne ekzistas najbaroj. Estas do necese, ke la malkontentuloj, kiuj plendas, ke ili vidis mian postaĝon, estu farintaj eksterordinarajn klopodojn kaj pagintaj dek centimojn por ĝin vidi; do, kial ili plendas, ĉar mi montris ĝin al ili?

**Vicprokuroro** Vi komplikigas la aferojn laŭplaĉe. Vi ja scias bone, ke la Justico kaj la Administracio estas du...

**Labriĝo** ... du kioj? Mi defias vin pri trovo de la diferenco!

**Prezidanto** Viaj malakordoj kun la Urbo ne koncernas la Tribunalon. Se vi havas por plendi pri la urbaj burooj, ataku ilin...

**Labriĝo** ... kaj lasu nin trankvilaj; mi antaŭvidis la objeton. Estas nur bedaŭrindaĵo, ke la burooj, kunligitaj kiel poŝostelistoj en bazaro, kiam temas pri la senmonigado de la impostpaganto, pretekstas sian nekompetentecon kaj kaſas sin unu malantaŭ la aliaj, tuj kiam la demando estiĝas pagi al li lian kreditoraĝon. Pri tio, kio koncernas min, jen la situacio: kvita pri la impostoj, paginte do per mia mono la rajton spiri – kion Dio donis al mi senpage – ĉu mi povas, jes aŭ ne, se estas tro varme al mi, teni miajn fenestrojn malfermitaj?

**Prezidanto** Jes.

**Labriĝo** Ĉu mi povas, en loĝejo, kiu estas mia, ĉar mi pagadas la lupon, ĉu do mi povas, jes aŭ ne, se mi perdis du grošojn, klini min por ili rekapti?

**Prezidanto** Jes.

**Labriĝo** En tiu sama loĝejo, ĉu mi povas, jes aŭ ne, se tio plaĉas al mi alivesti min kiel meksikano?

**Prezidanto** Jes.

**Labriĝo** Kiel turko?

**Prezidanto** Jes.

**Labriĝo** Kiel skoto?

**Vicprokuroro** (*fortavoĉe*) Ne!

**Labriĝo** Ne?

**Vicprokuroro** Ne!

**Labriĝo** Jen novaĵo kaj stranga Justico, kiu, alpremite al la muro, venkita de la Logiko, estas kondukita al distingo inter Turkio kaj Skotlando, kun la risko krei komplikajojn kaj perturbi la ekvilibron de Eŭropo!

**Vicprokuroro** Jam ne plu! Sufiĉas! Mi trapenetras vian artifikon, kaj krudajn klarigojn, viajn rakontaĉojn pri la du grošoj kaj jupo skota, kiu supreniĝas pro aerblovo. Sinjoro Prezidanto diris la veron: vi venis ĉi tien por primoki la homojn.

**Labriĝo** La homojn, ne, sed la Leĝon, kiu tute malpravas kriante pri skandalo, kiam bona knabo, kiel mi, simple punetas ĝin kun rido. Atentu, se iam la tikliĝemaj personoj intervenos, lacaj havi kiel defendantojn kontraŭ la homoj sen praveco nur Justicon sen justeco, eterne zorgantan domaĝi la sentaŭgulojn kaj ĉiam pretan foroferi la rajton sur la altaro de la juro, kies salajrata servisto ĝi estas...

(*Dume, de iom da tempo la Prezidanto komencis diskuti kun siaj du asesoroj; kiam Labriĝo finis sian frazon, la Vicprokuroro levigas kun kolera movo, sed la Prezidanto, kun paciga gesto trankviligas lin kaj invitas lin residiĝi. Post kio:*)

**Prezidanto** La juĝafero estas decidita. (*Deklarante.*) La Tribunalo, post interkonsento; – Ĉar la juĝa konstato de Sinjoro Grujero, asignisto, kaj la plendoj en la grava nombro da dek tri mil sescent okdek sep atestas, ke Labriĝo, spite la leĝojn pri la deco, malkovris, elmontris kaj publike malkaſis parton de sia persono destinitan resti sekreta; – ĉar la juĝoto, kvankam li konfesas la ĝustecon de la al li riproĉita fakteto, kontraŭdiras, ke ĉiu luanto havas la absolutan rajton uzi laŭ sia plaĉo la loĝejon, kiu estas lia, kaj interalie formeti de si ĉiun vualon, se tia estas lia fantazio, kun la kondiĉo, kompreneble, ke li ne fariĝu kaŭzo de skandalo por la najbaroj kaj la preterpasantoj, kaj tio estas precize lia kazoo; – ĉar

Labriĝo, malgraŭvole devigata de la varmeco teni siajn fenestrojn malfermitaj, sekve lasi sian privatan vivon al la kontrolo de nediskreta kaj spitmoka popolamaso, assertas, ke lia domicilo fariĝis la objekto de ĉiumomenta perforto, des pli serioza argumento, ke, se la unua trovita rajtas okulpenertri en privatan hejmon kaj rigardi tion, kio okazas en ĝi, de la supraĵo de rultrotuarō, tiu persono povas logike fari la samon pere de ŝtupetaro, de stango, de nodšnuro aŭ alia gimnastika aparato, kaj ke tiam la intimeco de la hejmo fariĝas vorto sensignifa;...

Labriĝo Tio estas lume klara!

Pedelo Silenton!

Prezidanto ... – ĉar estas nenio en la mondo, kio estas pli plene sankta, pli tute neperfortebla, ol ies privata domo; ke Cicerono<sup>5</sup> proklamas tiun bazan veraĵon, kaj ke konvenas konsideri la opinion de tiu jurkonsilisto..."

Labriĝo Tute prave! Tio estas skribite en la „Pro domo”: „**Quid est sanctius, quid est omni religione...**”

Prezidanto Mi tuj elpelos vin.

Labriĝo Mi petas mil pardonojn!

Prezidanto ... – sed aliflanke, konsiderante, ke la Legō, malgraŭ siaj poltronajoj, perfidoj, malnoblaĵoj kaj aliaj neperfektaĵoj, ne estas tamen farita, por ke la juĝebulo demonstru ties stultecon; konsiderante, ke, se tiu juĝebulo estas persone naŭzita pri ĝi, tio ne estas sufiĉa motivo, por ke li naŭzigu pri ĝi la aliajn; – konsiderante, ke apriore krimulo, kiu lerte evitas la leĝon, estas malpli timinda per sia agado, ol honestulo, kiu diskutas ĝin kun prudento kaj sagaco; – konsiderante, ke en Francio, kiel cetere en ĉiuj ŝtatoj, en kiuj malbonfaras la civilizacio, ekzistas efektive du specoj da „rajto”, la justa rajto kaj la leĝa rajto, kaj ke tiu **modus vivendi**<sup>6</sup> devigas la juĝistojn havi du konsciencojn, unu por servi ilian devon, la alian por servi ilian funkcion; – konsiderante fine, ke, se la juĝistoj komencas gajnigi ilian aferon al ĉiuj, kiuj pravas,

oni ne plu scias, kian vojon elekti, krom al la disfalo de socio, kiu plu staras nur pro kutimiĝo; – pro tiuj motivoj: – deklaras Labriĝon prava en lia defendosistemo..."

Labriĝo Brave!

Prezidanto „... tamen lin malpravigas..."

Vicprokuroro Bonege!

Prezidanto „... kaj, aplikante al li la 330an artikolon kaj la principon „ĉio tio daŭrigos almenaŭ tiel longe, kiel ni mem”, kondamas lin je dek tri monatoj da prizono, je 25 frankoj da monpuno kaj je la jugokostoj. – La kunsido estas finita.”

Labriĝo (*la juĝistoj levigas, dum Labriĝo kun okuloj al la ĉielo kaj tondra voĉo*) Mi apelacias al la posteularo!

5. fama romia juristo kaj advokato.

6. latinaĵo: vivmaniero.